

## Redakcia Informo

Membroj kaj abonantoj ricevas per ĉi tiu sendo la duan kajeron de la Scienca Revuo Vol. 48 por la kuranta jaro.

Tiu kajero (1997)(2) ankoraŭfoje reprenas la temon de la 90-jara ekzisto de ISAE per historie rerigarda kontribuo flanke de la longjara prezidanto.

La ĝisnuna kaj ankaŭ la nova vicprezidanto dediĉas sian artikolon pri 'Perekzamena Taksado' "omaĝe al Prof. d-ro C. Stöp-Bowitz, eminenta esperantista biologo, unu el la grandaj evoluigintoj de nia lingvo, longtempe estinta kaj alte ŝatata ekŝiĝinta Prezidanto de ISAE".

La esperantistoj pledas kutime, ke esperanto eniru la nacilingvan fakan literaturon; tiam estas reciproke nur normale, se ankaŭ nia faka redakcio enlasas originalajn fakajn artikolojn en esperantlingvan sciencon revuon, se la scienca artikolo aperas en ambau lingvoj. Tiu starpunkto estas eĉ memkomprena, kiam temas pri originala publikaĵo, kiu havas por la aŭtoro reputacian signifon en lia fako ankaŭ en lia nacia lingvo.

Unuafoje la redakcio do publikigas ne nur originalan artikolon esperantlingvan, sed samtempe ties nacilingvan tradukon. Tian publikigadon la redakcio efektivas en la aktualaj kajeroj 1997 (2) kaj (3). En ĉi tiea kazo temas pri interesa historia kaj scienca evento kiel la retrovo de ĝis nun ne konata notskribita muzikaĵo.

Plua kontribuo en ĉi tiu kajero estas la antaŭparolo de ampleksa verko, per kiu la aŭtoro intencas evoluigi esperantlingvan historian literaturon. Ni publikigos ĉapitron el tiuj originale verkitaĵoj 'Skizoj kaj fragmentoj el la historio' en unu el la venontaj kajeroj.

## Internacia Scienca Asocio Esperantista 90-jara.

La 30an de Aŭgusto 1996 Internacia Scienca Asocio Esperantista, la plej malnova faka asocio esperantista, atingos sian 90-jaran jubileon. La fondiĝo okazis dum la 2a Universala Kongreso en Ĝenevo en 1906. Formale la Asocio fondiĝis dum la 3a Universala Kongreso en Kembriĝo en 1907, sed oni ĉiam rigardis la fandan kunsidon en Ĝenevo kiel tiun de la reala fondiĝo. Inter la iniciatintoj estis la franca balistikisto generalo Hippolyte Sebert, membro de la Franca Akademio de Sciencoj; kredeble li povas esti nomata la patro de la internacia Esperanto-movado inter la sciencistoj. Ankaŭ poste, en 1924, la Franca Akademio de Sciencoj pledis por la utiligo de Esperanto en la sciencoj.

Jam antaŭ la fondiĝo de I.S.A.E., en 1904, aperis Internacia Scienca Revuo, kiu baldaŭ transiris al I.S.A.E. kaj aperadis ĝis la unua mondmilito. Plejparte la enhavo konsistis el referatoj pri sciencaj temoj, parte tradukaĵoj, sed ankaŭ originalaj esplorzultatoj. Menciinda estas traktaĵo de la svisa matematikisto René de Saussure, kiu cetere povas esti rigardata kiel la fondinto de la esperantologio. Ankaŭ multaj aliaj sciencistoj aktive laboris por Esperanto en sciencaj medioj, verkante popularsciencajn librojn aŭ raportojn pri originalaj esploroj, stimulataj de rondoj ĉirkaŭ I.S.A.E. Pluraj el tiuj aktivuloj estis prezidantoj de la Asocio. Antaŭ la unua mondmilito la funkcia periodo de la prezidanto laŭstatute ĉiam estis unujara. La unua prezidanto estis generalo Sebert (1906-1907, kaj denove 1911-1912).

Post la unua mondmilito la ĝenerala sekretario, inĝeniero Maurice Rollet de l'Isle, funkciis ankaŭ kiel prezidanto 1922-1925 kaj kiel redaktoro de la tiama Bulteno de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. Poste prezidanto fariĝis prof. Odo Bujwid en Krakovo (de 1925 ĝis sia morto en 1942).

Post la dua mondmilito ni starigis reorganizan estraron 1942-1950 (kiun mi prezidis), kaj en 1949 ni sukcesis pri aperigo de

Scienca Revuo dank' al la nederlanda eldonejo Muusses kaj al la meritplenaj redaktoroj W. F. Makkink, G. Hamming kaj poste d-ro W. P. Roelofs. De 1950-1953 prezidanto estis prof. Maurice Fréchet, Parizo, poste universitata rektoro Seiho Nishi, Tokio. Lin sekvis prof. W. E. Collinson, Liverpool, poste prof. Y. Väisälä, Helsinko, kaj fine prof. Boj. Popovic, Beogrado, kiu ankau transprenis la redaktorecon kaj eldonadon de Scienca Revuo. Post foriro de prof. Lapenna de U.E.A. en 1974 Popovic sekvis lin. En tiu kriza situacio transprenis la prezidantecon por unu 3-jara periodo prof. Sin'itiro Kawamura, Japanio. Redaktoro kaj ĝenerala sekretario fariĝis RNDr. Josef Kavka, Prago, kaj en 1980 la asocio elektis min prezidanto. Por senŝarĝigi Kavka ni trovis novan ĝeneralan sekretarion en la persono de Christian Darbellay; kiam li en 1988 malsaniĝis, la asocion denove trafis krizo, la membronombro malkreskis. Tiam aperis laborpreta kaj energia kunlaborulo, Rudi Hauger, svisa delegito de I.S.A.E. en Zuriko, kiu ne timis preni sur sin la trioblan taskon de kasisto, ĝenerala sekretario kaj redaktanto de Scienca Revuo. Energie li sukcesis reordigi la financojn kaj eldonadi la Sciencon Revuon. Kaj per la lasta ĝis nun elekto la Asocio denove havas kompletan kaj laborpretan laustatutan estraron.

Post tiu rapida trakuro de la historia evoluo de la Asocio ni rigardu eblajn celojn por la estonteco. Okaze de la 50-jara jubileo de I.S.A.E. en 1956 prof. Paul Neergaard, Kopenhago, redaktis kaj eldonis (en 1958) 241-paĝan libron Sciencaj Studoj kun 31 kontribuajoj de sciencistoj, bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj. Lia ideo estis daŭra aperigado de Sciencaj Studoj kiel 2-jara periodaĵo; tiu ideo bedaŭrinde ne realiĝis. Sed la eldonado de scienca revuo ekskluzive en Esperanto estas signifoplena. Se la internacia lingvo havu ian ŝancon por esti adoptata de la sciencistoj estas necese, ke ĝi eniru la ĝeneralan nacilingvan sciencon gazeton, ke en sciencaj revuoj de aliaj lingvoj almenaŭ aperu resumoj en Esperanto aŭ pli bone traktadoj de kompetentaj esperantlingvaj fakuloj pri iliaj rezultoj. - En Scienca Revuo, vol. 7, 1955, d-ro Roelofs publikigis

bibliografion, kiu ampleksis 86 nacilingvajn sciencajn periodaĵojn, kiuj akceptis Esperanton. Gravas antaŭ ĉio libroformaj sciencaj verkoj, ekz. tiu de Claude Roux pri likenoj. Signifon havas plie la Internacia Kongresa Universitato por la apliko de Esperanto, multaj el ties prelegoj estas publikigitaj en Scienca Revuo.

Tiuj literaturaj aktivecoj sur la kampo de scienco kaj tekniko jam konsiderinde maturigis la internacian lingvon. Aliaj gravaj verkoj estas la terminaroj, ofte kun difinoj en Esperanto kaj kun tradukoj en pluraj lingvoj, tiel ke ili povas esti utiligitaj ankaŭ ĝenerale kiel vortaroj.

Ni estas hodiaŭ pli realismaj ol antaŭ 90 jaroj, pli konsciaj pri la malfacilaĵoj, kiuj frontas nin; malpli valoras belaj rezolucioj senditaj al sciencaj akademioj kaj registaroj - pli valoras persista uzado de tiu internacia lingvo en la praktiko kaj kiel ekzemplo inter kolegoj.

Kiam mi nun, je la elektoj okazontaj je la proksima jarfino, forlasos la prezidantan seĝon, estas mia testamento al miaj posteuloj kaj al niaj Landaj Delegitoj kaj al ĉiuj niaj ceteraj membroj: aktivadu por kolekti ĉiujn esperantlingvajn sciencistojn kaj teknikistojn en nia faka asocio, kaj instigadu viajn kolegojn utiligadi Esperanton en la scienca laborado.

C. Støp-Bowitz.